Esperanto Societo Frankfurto

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.

gegründet 1904 – fondita 1904

julio 2014

# ESPERANTO-INFORMILO

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Esperanto-Gesellschaft Frankfurt/Main**<br><br>www.esperanto-frankfurt.de | 1. Vorsitzende:<br>Katarina Eckstädt<br>Geschwister-Scholl-Str. 1<br>63486 Bruchköbel<br>Tel. 06181 76343,<br>e-mail:<br>ke.esperanto@t-online.de | **Bankverbindung:**<br>Esperanto-Gesell-schaft Frankfurt /M.<br>**IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01**<br>**BIC: DRESDEFFXXX**<br>Commerzbank Frankfurt/Main | **Beitrag:**<br>mit DEB-Beitrag 80 €<br>Familienmitglied 40 €<br>Nur ESF: 20 €<br>Familienmitglied 10 € |

## LIBROFOIRO Rejnland-Palatinato

.




foto: schwanzer

Dum la unua librofoiro en Rejnland-Palatinato vizitantoj povis trovi ankaŭ Esperanto-librojn. D-ro Wolfgang Schwanzer, kiu gvidas la poŝtmendan librovendadon, montris elekton de Esperantolibroj al la vizitantoj.
Vi povas pri tio legi sur la tria paĝo.

## einladung zum klubabend    invito al la klubvespero

Bürgertreff Bockenheim
Schwälmer Str 28
Frankfurt am Main

## donnerstag, den 3. julio 14    ĵaŭdon, la 3an de julio 14

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten,
wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein, der am Donnerstag, **den 3. Juli 14** stattfinden wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj interesiĝantoj,
ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu okazos ĵaŭdon, **la 3an de julio 2014**

**18.30 h**

**sprachrunde**    **lingva rondo**

**DENNIS KEEFE**

Ni havos ĉi tiun vesperon gaston. Ĉar ni jam havas programon ni uzos la tempon por konatiĝi kun li.

**19.30 h**

## INVENTINTOJ DE LA AŬTOMOBILO



**Benz-Patent-Motorwagen Nummer 1 aus 1886**

Bis zu diesem Auto ist viel Zeit vergangen in der viele, heute nicht immer bekannte Träumer, Wissenschaftler, Bastler versucht haben, etwas zu machen, was schneller und stärker als Pferde ist und sich autonom bewegen wird. Da waren Heron, Nicholas Cugnot, Leonardo da Vinci…
Die kleine Automobilgeschichte wird uns erzählen…

Ĝis ĉi tiu aŭto estis konstruata forpasis multe da tempo en kiu multaj, hodiaŭ ne ĉiam konataj revemuloj, sciencistoj, metiaj amatoroj provis ion konstrui, kio estos pli rapida kaj forta ol ĉevaloj kaj memstare moviĝebla. Estis Heron, Nicholas Cugnot, Leonardo da Vinci…
La malgrandan historion de aŭtomobilo rakontos al ni …

**Ulli Fellmann**

**(vor) ERFINDER DES AUTOMOBILS**

## donnerstag, den 17. Juli 14    ĵaŭdon, la 17an de julio 14

**18.30 h**

**babbelstunden**    **babilaj horoj**

| geburtstage im juli | naskiĝtagoj en julio |
|---|---|

Dr. Robert Bittner, 06.07.
Katarina Eckstädt, 09.07.
Klaus Stoessel, 26.07.

**Ni gratulas!**

**Esperanto-Buchversand bei der 1. Buchmesse Rheinland-Pfalz dabei**

Es war eine gelungene Premiere: bei der ersten Buchmesse Rheinland-Pfalz konnte der Esperanto-Buchversand sein ausgewähltes Angebot an Büchern präsentieren und über die Internationale Sprache Esperanto informieren. Es präsentierten sich viele, meist kleinere Verlage sowie branchennahe Institutionen wie die Gutenberg-Gesellschaft und auch Zulieferer. Auf der zentralen Bühne wurde ständig ein spannendes Programm mit interessanten Gästen geboten. So gab der bekannte Fernsehkoch Johann Lafer kleine Kochgeheimnisse preis, der Arzt und Autor Prof. Dr. Dietrich Grönemeyer berichtete über seine Erfahrungen mit ganzheitlicher Medizin. Im Halbstundentakt wurden auf zwei weiteren Bühnen Lesungen und Diskussionsrunden zu einer bunten Themenpalette geboten - und mitten drin der Esperanto-Buchversand. Dies war sogar der Allgemeinen Zeitung Mainz eine kleine aber feine Erwähnung wert. So hat sicher auch die politische Prominenz, die mit Oberbürgermeister, Dezernenten und Ministerin gut vertreten war, nochmals lesen können, was sie tags zuvor gesehen hatten.
Die attraktive Präsentation von Büchern führte zu vielen intensiven Gesprächen über Esperanto. Etliche Besucher kannten, manche konnten sogar die Sprache, die meisten waren erstaunt über die Leichtigkeit der Grammatik und über die reichhaltige Literatur. „Esperanto ist ja wirklich eine sinnvolle Sache", diesen Satz konnte man oft hören. Alle darauf Angesprochenen zeigten Unverständnis, dass Esperanto nicht beim Schülerwettbewerb Fremdspra-

**Esperanto-poŝtmenda librovendado partoprenis la unuan librofoiron de Rejnland-Palatinato**

Estis sukcesoplena premiero: ĉe la unua librofoiro de Rejnlando-Palatinato Esperanto-poŝtmenda librovendado povis prezenti sian elektitan oferton de libroj kaj informi pri la internacia lingvo Esperanto. Multaj prezentis sin, plej ofte malgrandaj eldonejoj same kiel la branĉoproksimaj institucioj kiel Gutenberg-Asocio kaj subkontraktaj entreprenoj. Sur la ĉefa podio estis daŭre prezentata streĉa programo kun interesaj gastoj. La konata televida kuiristo Johann Lafer malkaŝis malgrandajn kuirsekretojn, la kuracisto kaj aŭtoro prof. d-ro Dietrich Grönenmeyer raportis pri siaj spertoj pri antropozofia medicino. Sur du aliaj podioj estis prezentataj ĉiu duonhore legadoj kaj diskutadoj pri diversaj temoj – en la mezo de tio la Esperanto-poŝtmenda librovendado. Tion rimarkis eĉ la „Allgemeine Zeitung Mainz“ (ĵurnalo el Majenco) kaj presis la malgrandan sed tre bonan artikolon. Tiel povis ankaŭ politikaj eminentuloj, reprezentataj de ĉefurbestro, altaj ŝtataj oficistoj kaj ministrino legi pri tio kion ili antaŭan tagon vidis.
La atrakcia prezentado de la libroj gvidis al multaj intensaj interparoladoj pri Esperanto. Sufiĉe multaj vizitantoj konis, iuj eĉ scipovis la langvon, plej multaj estis miregitaj pri la facileco de la gramatiko kaj riĉeco de la literaturo. „Esperanto estas vere utila afero“, ĉi tiun frazon oni povis ofte aŭdi. Ĉiuj alparolataj montris nekomprenemo, ke Esperanto ne estas allasita ĉe la lernanto-konkuro de fremdlingvoj. Kompreneble ekzistis ankaŭ rezervado aŭ skeptikeco, tamen sume estis akceptemo de Esperanto ĉe la publiko mirige granda. Tio montras kiom grave estas iri al la publikeco, ĉu per informostandoj, ĉu per gazetara komunikaĵo aŭ aranĝoj kiuj

chen zugelassen ist. Natürlich gab es auch Vorbehalte oder Skepsis, aber insgesamt war die Aufgeschlossenheit dieses Publikums gegenüber Esperanto erstaunlich groß. Dies zeigt, wie wichtig es ist, aktiv auf die Öffentlichkeit zuzugehen, sei es an Informationsständen, durch Pressemitteilungen oder Veranstaltungen, die Außenwirkung entfalten, nach dem alten Motto "Wir müssen viel mehr Deutsch reden, wenn wir Esperanto verbreiten wollen!"

Dr. Wolfgang Schwanzer
Esperanto-Buchversand

disfaldas efikon, laŭ la malnova moto „Ni devas multe pli paroli la germanan, se ni volas disvastigi Esperanton!“

Dr. Wolfgang Schwanzer
Esperanto-poŝtmenda librovendado



foto:ws

Dr. Wolfgang Schwanzer
kun vizitanto

## SOMMERFEST — SOMERA FESTO

fotoj: Martin Schmitt kaj Ulli Fellmann



Dum antaŭaj jaroj rostis la viandon viroj, en ĉi tiu jaro estis virinoj ĉefaj agantoj.



Post bonaj viando kaj saladoj salatoj ni sidis kaj diskutadis pri la lingvo, pri la ĵus pasinta Germana Esperanto-Kongreso.



S-ro Ullmann havas ideon pri kiu ni diskutas.



S-ino Stoessel faris gaelan kafokukon. Nia gastiganto, s-ro McMahon, estas irlandano. Ŝi promesis doni al ni la recepton.